

Nia feria migrado en Alpoj, 3-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 623, 1975.09.17 & 20

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Por plilongigi la someran periodon ni invitas vin ferii kun ni daŭrigante raporton pri migrado okazinta en Berna Oberlando.

A.- La lundon 4-an de aŭgusto ni rendezvous je la deka kaj duono sur la stacidoma placo de Meiringen. Ĉar ni tranoktis en la proksimeco en nia ruldomo, ni troviĝis inter la unuaj alvenantoj. Ni parkis nian aŭtomobilon kaj dum ni metis niajn montŝuojn kaj finpretigis niajn dorsosakojn, ni rimarkis esperanto-flagon sur la tornistro de marŝanto. Estis Alberto el Grenoble.

Cl.- Post kurado al magazeno por kompletigi nian provianton piknikan ni sidiĝis en kafeja ĝardeno vidalvide de la stacidomo. Baldaŭ alvenis la ĝenevano Andres. Li rakontis, ke jam de kvin semajnoj li migradas. Unue en la montaro Ĵuraso kaj poste en la nacia parko de la kanton Grizono li ekskursadis tendumante. Sub sia kamarga ĉapelo li similis al alpinisto de la romantika periodo.

A.- Preskaŭ samtempe alvenis Cosette el La Chaux-de-Fonds, la budapeŝta studentino Ilona, kiu jam esploradis Oberlandon dum unu semajno, kaj Odila el Bordeaux. Iom poste eltraniĝis Danjelo el Brugg, Maŭrico el Zŭrich kaj Renée el Lyon. Fine ni vidis grandan viron, kiu paŝadis. Estis Henri el Besançon. La grupo estis kompleta.

Cl.- Ĉirkaŭ la kafeja tablo la konversacioj jam viglis. La partoprenintoj al la pasintjara migrado rakontis pri la tiama pluva vetero kaj esprimis la esperon, ke ĉijare la suno nin ne forlasos. Aliaj sin prezentis aŭ memorigis aliajn eventojn.

A.- Subite eksonis la marŝ-signaloj : « *Ek al !* » Ĉiuj leviĝis. Aŭdiĝis komuna plendo pri la pezo de la dorsosakoj, sed tamen la grupo rapidpaŝe direktiĝis orienten. La belaj ĉaledoj kaj la florbedoj vekis admirajn rimarkojn. La lignaj skulptitaĵoj en la montrofenestroj de magazenoj paŭzigis nin. Tamen rapide ni alvenis sur la kampara vojo kondukanta al la gorĝo de la rivero *Aare*.

Cl.- Tiu gorĝo estas unu el la vidindaĵoj de Oberlando. Enirante tiun fendegon, kiun la glaĉeroj kaj la akvo boris dum centmiloj da jaroj, ĉiuj estis profunde impresitaj. Funde de la mallarĝa kanjono tumultas la rivero. Vojetoj tunela aŭ pendgaleria permesas laŭiri la tutan fendegon pli ol unu kilometron longan.

A.- Alpkornisto muzikadis en loko, kie la rokvaĵoj formis adekvatan muzikejon, kaj la sonoj de lia primitiva kantado aŭdiĝis jam de malproksime. La turistoj dankis lin ĵetante moneron en lignan pelveton.

Cl.- Kie la gorĝo larĝiĝas, sur la sablo de la riverbordo la vizitantoj amuziĝas skribante sian nomon per ŝtonoj, kaj bela akvfalo fontanas el almenaŭ alteco de 50 metroj.

A.- Ĉiuj konsentis, ke tiu vizitado de la gorĝo *Aareschucht* estis konvena enkonduko al la migrado.

Cl.- La unua pikniko okazis borde de la rivero Aare. Ĉiu ĉerpis el la propra provianto. Kaj « *Ek al !* » Ni remetis sur niajn ŝultrojn la pezaj tornistron. Ĉifoje ni paŝadis okcidenten. Ni celadis grandan akvofalon muĝantan meze de montflanko vidalvide de *Meiringen*. Ĝi nomiĝas *Reichenbachfall*. Por ĝin atingi ni pigre sidiĝis en kablotramo, kiu alsuprigis nin ĝis belega rigardejo. Antaŭ ni la rivero faladis ventumilforme. Bela naturspektaklo impesiga.

A.- Per pado, kiu serpentumas en la roka montflanko ni atingis la supron de la akvofalo. Jam la fundo de la valo ŝajnis tre malproksima.

Cl.- Ni daŭrigis la marŝadon supren. Ekzistis du vojplanoj. Unu pado skevas la fundon de la valo. Alia, malpli bone markita, foriras en la arbaron direkte al rokvandoj. Tiun ĉi lastan ni elektis, ĉar ĝi disvolviĝis en la ombro. Vice ni marŝadis, ŝvitantaj kaj admirantaj la pejzaĝon. Ni trairis idiliajn paŝtejetojn kun lignaj dometoj. Sur unu el tiuj alpejoj ni rimarkis spurojn el la festado de la nacia festo svisa de la 1-a de aŭgusto. Ni sidiĝis en tre bela loko, kie la brutoj ne jam paŝtis, kaj ni alproksimiĝis al la rokar-bordo. Tute sube, kiel el aviadilo, ni vidis la vilaĝojn en la valo. Super ni la rokaro tro deklivis, por ke ni antaŭeniru. Tial, post ripoza paŭzo ni devis realvali serĉante alian padon. Kaj ni realsupris ĝis tre krutaj herbejoj, kie paŝtadis bovidinoj. Estis florpharadizo.

A.- La brutoj venis al ni en la espero, ke ni alportas al ili salon. Ili emis leki nin. Pikdratajn barilojn ni devis trapasi, antaŭ ol daŭrigi la grimpadon.

Cl.- Fine ni atingis la celon. Sur pli milda deklivo la naturamika domo *Reutspierre* akceptis nin. Dum la gvidantoj Maŭrico kaj Danjelo iris diskuti kun la gardisto-kuiristo pri la vespermanĝo, ni nin senŝuiĝis kaj pretiĝis por la vespero. Mia edzino elsakigis fluton kaj kantlibron. Sur benko antaŭ la domo, kie grupiĝis la partoprenantoj, ŝi ludis svisajn popolkantojn. Kaj ĉiuj kune ni admiris la sunsubiron kaj la pejzaĝon.

A.- Bona vespermanĝo kaj ŝercoplana vespero konkludis la unuan migradtagon. La venontan semajnon ni raportos pri la dua tago.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!